La Hodiaŭa Ĵurnalo

2018-01-04 n-ro 406

# En la unua tago de la nova jaro naskiĝis 390 mil beboj



Kim Jong-un ordonis remalfermi kanalon de komunikado kun Sud-Koreio en Panmunjom

Diamantosimila materialo el grafeno

De kie devenas la nomoj de valutoj?

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopiniaj kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

KIM Jong-un ordonis remalfermi kanalon de komunikado kun Sud-Koreio en *Panmunjom*
*Labornivela diskuto p. 03*

Palestino forte kondamnis Jerusaleman Leĝon adoptitan de Israelo
*Plia paŝo de Usono kaj Israelo por subfosi la du-ŝtatan solvon p. 03*

Demokratia Respubliko Kongo: ok mortintoj en manifestacioj
*82 arestoj inter kiuj pastroj p. 04*

Hispanio: detencento de *Archidona*: enigma morto de alĝeria kaŝmigranto
*La mortinto estis trovita pendumita per drapo p. 05*

Sigelo 2700-jaraĝa de la tiama jerusalema subŝtatestro estis trovita
*Periodo de Templo de Salomono p. 05*

En la unua tago de la nova jaro naskiĝis 390 mil beboj
*Plejparto el ili estis naskitaj en malriĉaj regionoj p. 06*

Bioimitado
*Sub la inspiro de strukturoj, kiuj ekzistas en la naturo p. 07*


Diamantosimila materialo el grafeno
*Du tavoloj de grafeno p. 08*

De kie devenas la nomoj de valutoj?
*Estas interese iom "detektivi" p. 08*

Hodiaŭe
*GAO Xingjian; Spomenka ŠTIMEC; kaj Urso p. 09*

# Kim Jong-un ordonis remalfermi kanalon de komunikado kun Sud-Koreio en *Panmunjom*

La Korea Centra Televido raportis merkrede [03 jan 2018], ke la plej alta gvidanto de la Korea Demokratia Popola Respubliko Kim Jong-un 김정은; [kim tɕʌŋ.ɯn] jam ordonis denove malfermi la kanalon de komunikado kun Sud-Koreio en *Panmunjom*, kiu estis tranĉita en la komenco de 2016.



La Komitato de la KDPR por Paca Reunuigo de la Patrolando diris, ke la komunika kanalo renormaliĝos je la 3-a horo kaj 30 minutoj posttagmeze laŭ la loka tempo por fari labornivelan diskuton pri demandoj koncernaj al la sendo de la delegacio de la KDPR al la Vintraj Olimpikoj en *Pyeongchang* de Sud-Koreio. La komitato diris, ke komisiite de la plej alta gvidanto Kim Jong-un, la KDPR strikte kontaktos la sud-korean flankon kun serioza kaj sincera sinteno.

La kanalo de la interkorea komunikado estis tranĉita, post kiam la antaŭa sud-korea registaro unuflanke fermis la interkorean industrian zonon en la landlima urbo Kaesong de la KDPR post la kvara nuklea provo de Pjongjango en januaro de 2016.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Palestino forte kondamnis Jerusaleman Leĝon adoptitan de Israelo

La israela parlamento adoptis en la lunda meznokto [01-02 jan 2018] la Jerusaleman Leĝon, kiu preskribas, ke aprobo per almenaŭ du trionoj da voĉoj (80) de la parlamento estas bezonata por forlasi iun ajn pecon da jerusalema tereno. Palestino esprimis fortan kondamnon marde [02 jan 2018], Israelaj amaskomunikiloj raportis marde [02 jan 2018].



Saeb Erekat, ĝenerala sekretario de la Plenuma Komitato de la Palestina Liberiga Organizo, emfazis marde [02 jan 2018], ke adopto de la Jerusalema Leĝo estas plia paŝo de Usono kaj Israelo por subfosi la du-ŝtatan solvon, post kiam Usona Prezidento Donald Trump deklaris agnoski Jerusalemon kiel ĉefurbon de Israelo en la lasta monato. Erekat diris, ke la palestina flanko okazigis 36 intertraktadojn kun la usonaj aŭtoritatoj pri la procezo de paco inter Palestino kaj Israelo, sed Usono malobservis sian promeson. Li aldonis, ke Palestina Prezidento Mahmoud Abbas diris, ke Usono estas ne plu unu el partioj solvantaj la problemon, sed partio kreanta problemon. La palestina flanko jam rompis sian komunikadon kun Usono kaj deklaris, ke Usono ne estas plu mediacianto pri la palestina-israela paco.

Yu
Ĉina Radio Internacia



# Demokratia Respubliko Kongo: ok mortintoj en manifestacioj

Pasintan dimanĉon [31 dec 2017], la sekurecaj fortoj de Demokratia Respubliko Kongo (DRK) intervenis en preĝejoj dum mesoj per larmigaj gasoj, kaj malhelpis marŝadojn post la alvoko de katolikoj, manifestacii kontraŭ la plua prezidenteco de Joseph Kabila.

Entute ok personoj estis mortigitaj kaj cent aliaj arestitaj okaze de tiuj manifestacioj organizitaj kontraŭ la plua prezidenteco de Joseph Kabila.

Laŭ UN-informfonto, sep personoj estis mortigitaj en Kinŝaso kaj alia en Kanango, centre de la lando.

«82 arestoj inter kiuj pastroj», okazis en Kinŝaso, kaj «41 aliaj en la cetero de la lando», aldonis la sama informfonto.

La ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, António Guterres, en komunikaĵo en Novjorko, alvokis «la registaron kaj la naciajn sekurecajn fortojn, al moderiĝo kaj respekto de la rajto de la konga popolo je esprimliberecoj kaj pacaj manifestacioj».

Interreto estis interrompita, pluraj policaj baroj estis instalitaj sur la ĉefaj vojoj.

Tiuj marŝadoj estis organizitaj de la kongaj katolikoj, jaron post la subskribo de interkonsento, sub egido de la episkopoj, kiu antaŭvidis balotadon fine de 2017, por organizi la foriron de la prezidento Joseph Kabila.

Tri personoj estis vunditaj per kuglo en la paroĥo *Don Bosco* en la municipo *Masina*, laŭ kelkaj informfontoj.

En Lubumbaŝo (sud-oriente), dua urbo de la lando, tri personoj estis vunditaj per kuglo. La sekurecaj fortoj pafis, dum la katolikoj provis manifestacii dum eliro de meso.

Neniam Milito Inter Ni

# Hispanio: detencento de *Archidona*: enigma morto de alĝeria kaŝmigranto

Alĝeria kaŝmigranto mortis en la detencentro *Archidona* en Malago, Hispano. La 36-jara viro sin pendumis en sia ĉelo. Tiu tragika evento kaŭzis veran tumulton en Hispanio. NROj pri la homaj rajtoj akuzas la hispanan ministron pri internaj aferoj, Juan Ignacio Zoido.




La mortinto estis trovita pendumita per drapo, dum li estis tre malsana, raportis la hispana jurnalo *Deia.com*, pasitan sabaton.

Ĝis nun, neniu detalo aperis, nek pri la identeco de la viktimo, nek pri la cirkonstancoj de lia morto. Pluraj NROj pri la homaj rajtoj denuncas skandalon, des pli ke ili antaŭnelonge publikigis plurajn raportojn, pri la tieaj aĉaj kaj nehumanaj vivkondiĉoj.

Alarmo estis lanĉita plurfoje dum la lastaj monatoj fare de tiuj asocioj. Pluraj el ili bedaŭris la fakton, ke la kaŝmigrantoj ĉeestantaj en la detencentro, estas enkadrigitaj de kontraŭribelaj brigadoj, kaj ne de kvalifita personaro. Kaj tio estas malgraŭ la kresko de la nombro de alĝeriaj kaŝmigrantoj, de post pasinta decembro.

Pluraj kazoj da perforto aliparte estis menciitaj.

De 24 horoj, tiuj hispanaj NROj postulas demision de la ministro pri internaj aferoj Juan Ignacio Zoido, montrita kiel nerekta kulpinto de tiu enigma morto, kiun ili kvalifikas «suspektinda».

Neniam Milito Inter Ni

---

# Sigelo 2700-jaraĝa de la tiama jerusalema subŝtatestro estis trovita

La 1-an de januaro 2018 Nir Barkat, la urbestro de Jerusalemo, anoncis gravan arĥeologian malkovron: kadre de fosadoj je ĉirkaŭ 100 metroj for de "Muro de lamentadoj" estis trovita tre altvalora argila sigelo. Ĝi enhavas la enskribon "Urba ŝtatestro", kaj datiĝas de la periodo de Templo de Salomono (la 7-an jarcenton a.K), ankaŭ konata sub la nomo de unua templo, kiu estis, laŭ Biblio, la unua juda templo de Jerusalemo konstruita de la reĝo Salomono [שְלֹמֹה].



Tiu objekto estas tre malgranda – 15 mm diametra kaj 3 mm dika – kaj ĝi estis uzita por sigeli korespondaĵojn kaj dokumentojn oficialajn. La enskribo prezentas du homojn vidalvide kaj inter ili desegnon ŝajnante lunon. En ĝia suba parto estas skribaĵo farita per la biblia hebrea lingvo.

Laŭ la kunordiganto de la fosadoj, doktorino Shlomit Weksler-Bdolah , "unuafoje oni trafas tian materialon pere de arĥeologia fosado en Jerusalemo. Ĝi konfirmas bibliajn raportojn pri ekzisto de estro por la urbo Jerusalemo antaŭ ĉirkaŭ 2.700 jaroj".

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog

# En la unua tago de la nova jaro naskiĝis 390 mil beboj

Fremdlanda amaskomunikilo raportis, ke daŭre kreskas la monda populacio. La Fonduso de Unuiĝintaj Nacioj por Urĝa Helpo al Infanoj taksis, ke en la unua tago de la kuranta jaro novnaskitoj kalkuliĝis al 390 mil, kaj plejparto el ili estis naskitaj en malriĉaj regionoj.

**Pli ol duono estis naskitaj en tiuj naŭ landoj**

La fonduso, kies ĉefsidejo troviĝas en Nov-Jorko, informis, ke inter la preskaŭ 390 mil novaj civitanoj, pli ol duono naskiĝis en tiuj naŭ landoj: Barato, Ĉinujo, Niĝerujo, Pakistano, Indonezio, Usono, Demokratia Respubliko Kongo, Etiopujo kaj Bangladeŝo. La taksita nombro de novnaskitoj estis bazita sur la raporto Perspektivoj pri la Monda Populacio en 2017 publikigita de Unuiĝintaj Nacioj.

**2,6 milionoj da beboj mortis dum la unua monato**

La fonduso substrekis, ke plejparto da beboj postvivas, tamen iuj mortis en la unua tago post la naskiĝo. La institucio diris, ke en 2016 ĉiutage ĉirkaŭ 2 600 beboj mortis ene de 24 horoj post la naskiĝo. Ĝi deklaris: "Por preskaŭ du milionoj da novnaskitoj, la unua semajno estas la lasta semajno en iliaj vivoj."

La fonduso rimarkigis, ke 2,6 milionoj da infanoj mortis dum la unua monato post naskiĝo, kaj 80% el ili mortis "pro eviteblaj aŭ antaŭforigeblaj kaŭzoj", ekzemple frua akuŝo, akuŝa komplikaĵo, sangoveneniĝo, pulmito kaj aliaj infektoj.



**Novjara celo**

Petersen, fakulo pri sano el la institucio, emfazis, ke en la nova jaro la fonduso celas doni al ĉiu infano vivon pli longan je unu horo, unu tago aŭ unu monato." Li alvokis registarojn de ĉiuj landoj partopreni en la batalo por savi la vivojn de milionoj da infanoj.

Liu Zijia
El Popola Ĉinio

# Bioimitado

En la jaro 1997, usona verkistino popularigis novan terminon "Biomimetismo". Eble en Esperanto oni devus preferi la tradukon "Bioimitado". Ĝi celas nomi fakon en scienco, kiu provas krei novajn objektojn aŭ sistemojn, sub la inspiro de strukturoj, kiuj ekzistas en la naturo. Oni eĉ fondis Instituton de Bioimitado, fonditan en la jaro 2006, en la subŝtato *Montana*, en Usono. Praktikaj ekzemploj de atingoj de tiu scienca fako estas gluaĵoj similaj al substancoj troveblaj en la piedoj de speco de lacerto. Alia estas materialo, kiu puriĝas sub pluvo, kiel lotusflora petalo. Aŭ kompleksaj sistemoj, en kiuj tute ne ekzistas malŝparado, kiel en la ekologia sistemo de natura arbaro.



En tiu jaro 2017 oni feste rememoras la atingon de unu bela ekzemplo de sukceso ene de Bioimitado. Nome, en la jaro 1997, kiam la rapidtrajno en Japanujo atingis la rapidecon de 270 kilometroj hore, la entrepreno, kiu produktis ĝin alfrontis gravan problemon. Kiam la trajno eliris el tunelo, okazis neeltenebla bruego, kiel eksplodo, aŭdebla kelkcent metrojn for. Tio kaŭzis grandan ĝenon en la ĉirkaŭaĵo. Feliĉe, unu el la inĝenieroj, kiu havis kiel hobion la observadon de birdoj, trovis la solvon. Li observis, ke la eta alcedo plonĝas en la akvon en rapidega movo, kaj tamen ne ŝprucigas akvon, kvankam ĝi eniras en densan (akvan) medion el maldensa (aera) medio. Kaj li trovis, ke la sekreto estas la formo de ĝia beko. La inĝeniero desegnis plurajn formojn por la antaŭa parto de la trajno, kaj tiu, kiu kaŭzis malplej da bruo estis precize tiu, kiu imitis la bekon de alcedo.

Alia faktoro, kiu produktis la trajnan bruegon estis metala retforma strukturo, kiu kuŝas sur la supra parto de la trajno kaj provizas elektron al ĝi. Tie, la aero, dum la moviĝado, kaŭzis kirlojn kaj turbuladon. La inĝeniero desegnis alispecan strukturon, similan al la plumoj de noktuo – ĉi tiu birdo estas konata interalie pro sia silenta flugo. Tio malpliigis la trajnan bruon.


Sub tiu sama retstrukturo, li krome desegnis surfacon tute glatan, imite al la tute glata ventro de speco de pingveno el la Antarkta regiono, konata pro sia facila glitado sur akvo.

Rezulte de tiaj lertaj ŝanĝoj, rapidtrajnoj en Japanujo povas atingi la rapidecon de 320 kilometroj hore, tamen sen troa bruado. Nuntempe, la fervoja reto en tiu lando estas uzata de multaj milionoj da homoj, ĉiutage. Ĝi estas strategie grava servo. Per Bioimitado oni povis evoluigi ĝin al kontentiga rezulto.

Paŭlo Sergio Viana
Esperanta Retradio

# Diamantosimila materialo el grafeno

Sciencistoj el la novjorka universitato prezentis kiamaniere eblas utiligi du tavolojn de grafeno, ĉiu kun dikeco de unu atomo – por produkti en la ĉambra temperaturo diamantosimilan materialon. Baptita anglalingve *„diamene”* ĝi havas eksterordinarajn proprecojn, kiuj povas trovi multajn aplikojn – de akvoimunaj protektosurfacoj ĝis ultraleĝeraj kugloimunaj kamizoloj.



Diameno estas la plej maldika iam ajn kreita materialo havanta rigidecon kaj malmolecon de diamanto. Dum la testado de grafito aŭ unusola grafentavolo oni sentas molan tavolon. Sed kiam la grafita folio estis dutavola evidentiĝis, ke la materialo sub la premo fariĝas eksterordinare dura kaj pli rigida ol diamanto. Diameno estas mola kaj fleksebla nur ĝis momento kiam oni grandigas premon.

Grafito kaj diamento estas karbonaj substancoj, sed la atomoj en ĉi tiuj materialoj estas aranĝitaj diversmaniere, kun kio ligiĝas iliaj proprecoj. La nova tekniko prilaborita de usonaj sciencistoj ebligas manipuli per grafeno tiel, ke ĝi akiru en difinitaj kondiĉoj deziratajn proprecojn de diamanto.

Pola Retradio

---

# De kie devenas la nomoj de valutoj?

Komuna valuto de Eŭropa Unio EŬRO videble devenas el la nomo de kontinento Eŭropo. Sed de kie venas aliaj nomoj? Estas interese iom "detektivi".



Kelkaj nomoj devenas de la bildo sur iu flanko (averso/renverso) de la monero. Plej konata estas KRONO, simbolo de reĝa potenco, ekzemple en Ĉeĥujo, Slovakujo, Danujo, Norvegujo, Svedujo... Reĝan potencon simbolis ankaŭ leono sur ŝildoj de militistoj. Rigardu rumanan LEI kaj bulgaran LEVO. La portugala ESKUDO signifas ŝildon. La monero ofte surhavas krucon, simbolon de kristanismo. De tio devenas nomo de brazila KRUZEJRO, aŭ malnova aŭstra KREJCERO. Ofte portreto de la reĝo ornamis moneron. Jen la deveno de la hispana REALO, ekzemple.

Nomo de la mono venas de oro, el kiu komence oni monerojn faris, aŭ de la marko, kiu atestis pri konstanta valoro de la metalo: ZLOTO en Pollando, GULDENO en Nederlando, AŬRO en Islando, MARKO en Germanujo kaj Finnlando.

La ganaa CEDO signifas konkon – iama pagilo.

La nomo povas ankaŭ montri pezon de la metalpeceto, kiel ekzemple itala LIRO kaj brita PUNDO, same hispana PESETO.

Fine, TALERO (DOLARO) sian nomon ricevis de la germana produktoloko en la 16-a jarcento: Joachimsthal. La signifo de la vorto talero: aĵo el Joachima valo.

Ĉu vi scias de kio venas la nomo de via mono?

Zoltan Kurucz
Turka stelo, n-ro 25



## GAO Xingjian

**GAO Xingjian [** 高行健 Gāoxíngjiàn**] (naskiĝinta la 4-an de januaro 1940 en *Tajĝou* (Ĝjangsuo)) estas ĉina verkisto kaj pentristo. En 2000 oni aljuĝis al li la Nobelpremion pri literaturo.**

**Vikipedio**

## Spomenka ŠTIMEC



**Spomenka ŠTIMEC [spomenka ŝtimec] (naskiĝis en *Orehovica* la 4-an de januaro 1949) estas kroata verkistino, tradukisto, instruisto de Esperanto.**

**En Esperanto aperis pluraj verkoj.**

**Vikipedio**



## Bildo de la tago

**Polusa urso, *Ursus maritimus*.**

**Vikipedio**